



LA ERIKEJO

Sekretariejo:

S-ino P. Huybrechts
Rozendreef 33
2180 Kalmthout
tel.: (031) 66 99 88

Kalmthout, aprilo 1981-a

La estraro de la Kalmthout-a Esperanto-grupo La Erikejo
ŝatus havi la ĝojon ke vi partoprenus en kelkaj el la eroj de la
festado de la

dekjara ekzisto,
je dimanĉo la 24-a de majo 1981-a.

Programo:

- 1) 11.00a h: Renkontiĝo ĉe la stacidomo de Kalmthout por komuna vizito al la ARBORETUM, kie la azaleoj kaj rododendronoj plene floradas. Enirprezo: BF 25.-.
- 2) 12.30a h: Kampina bufedo en salono "De Heibloem". Partoprenprezo: BF 450.-. Antaŭa enskribiĝo necesa!
- 3) 13.30a h: Ekpromeno al la erikejo de Kalmthout.
- 4) 15.15a h: Festa sesio en salono "De Heibloem"
 - a) De Smet W., prezidanto de LA ERIKEJO, parolos (nederlandlingve) pri la dekjara ekzisto de la grupo.
 - b) Symoens E., prezidanto de la Flandra Esperanto-Ligo, parolos (nederlandlingve) pri la rolo de la lokaj grupoj en la Esperanto-movado.
 - c) Demonty M., prezidanto de Belga Esperanto-Federacio: "Esperanto en Belgio".
 - ĉ) Maertens G., prezidanto de Universala Esperanto-Asocio: "Perspektivoj de la Esperanto-movado en la venontaj jaroj".
 - d) Omaĝo al kelkaj membroj.
 - e) Gratuloj de kelkaj, i. a. de la komunumestro de Kalmthout, s-ro L. van den Maagdenberg.
- 5) 17.15a h: Komuna foto.
- 6) 17.30a h: Honoraj trinkaĵoj.

Por partopreno al la Kampina bufedo (budenoj, viandaj bulkoj, ŝinko, fromaĝo, riza kaĉo, kafo) necesas enskribiĝi antaŭ la 15-a de majo. Pagoj povas okazi al konto 001-0779431-15 de LA ERIKEJO aŭ surloke al la kasisto. Enskribiĝu ĉe la kasisto de LA ERIKEJO, E. Boehme, Plantinlaan 10, 2090 Stabroek, telefono (031) 64 40 47.

La salono "De Heibloem" de festentreprenisto Liza troviĝas je la adreso Heuvel 62, Kalmthout, je ĉirkaŭ 500 m de la stacidomo de Kalmthout. Tel.: (031) 66 92 70.

Estu bonvenaj!

La estraro de LA ERIKEJO